


ELDONO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO (REU)
№ 108, novembro 2019

## RUSIAJ ESPERANTO-TAGOJ - 2020

# RET-2020

**2020-07-10/19**

## *«Siberio invitas vin!»*

### Informilo numero 1



**Datoj:** la 10-19-an de julio 2020.

**Loko:** Ripozejo «Brusnika», 30 kilometrojn for de la urbo Krasnojarsko (mapo).

**Loĝkondiĉoj**

la bazejo situas en la pina arbaro ĉe la bordo de la montarsiberia rivero Mana. La bazejo posedas duetaĝajn lignajn dometojn kun ĉiuj oportunaĵoj: duŝejoj, necesejoj, televidiloj, fridujoj. En grandaj loĝblokoj estas teujoj, mikroondaj fornoj. En la teritorio ekzistas kelkaj oportunaj laŭboj, sporta placo, loko por lignofajro. Al la belega bordo de la rivero gvidas kruta ŝtuparo. Je 200 metroj troviĝas la vilaĝo Ustj-Mana.

De la urbo Krasnojarsko funkcias busoj, elektrotrajnoj.

Ĉambroj estas de jenaj kategorioj: 3-4-6-8-lokaj; kelkaj estas por 2 personoj.

**Teknikaĵoj**

Funkcias operatoroj de poŝtelefona komunikado: MTS kun interreto de «E»-reĝimo, TELE-2 kun interreto. Pri funkcio/malfunkcio de aliaj operatoroj ne estas informo.

Estas vifio, sed malforta, nur por letera-teksta komunikado.

**La prezo** por unu tagnokto pro persono (loĝado + 3-foja manĝado) estas 1550 ₽. Tiu prezo egalas por ĉiuj loĝkategorioj. NE MANĜI ne eblas.

Manĝado eblas vegetara.

### Flosado

RET-2020 estos neordinara. La 10-12-an de julio estas planata flosado laŭ la rivero Mana. La ĉefa enloĝigo en «Brusnika» okazos la 12.07.2020.

Flosadon organizas speciala firmao kun trejnitaj flosistoj. En la flosoj estas bionecesejo, tablo kaj benkoj. Profesia kuiristo preparos manĝojn. Lokoj por tagaj haltoj kaj noktumado estas speciale aranĝitaj kaj prilaboritaj kontraŭ iksodoj. Ekzistas eĉ turisma banejo!

Enprogramitas pilkludoj, kvizoj, kantado ĉe vespera lignofajro, ĝuado de pitoreska siberia naturo, kiu jam hodiaŭ atendas vin!

Starto al la flosado la 10-an de julio estos de E-klubejo (en Krasnojarsko) per la buso de la flos-firmao, kaj la fino — ĉe la bazejo «Brusnika» la 12-an de julio.



*Por dezirantoj. Ne estas deviga partopreno.*

Prezo de la flosado por unu persono por tuta periodo: 4500 ₽. Ĝi inkludas: busveturadon, manĝojn, dormosakon+turisman tapiŝeton, lokon en tendo.

Apartan manĝon por vegetaranoj dum flosado oni ne preparos, sed povos disdoni ordinaran manĝon, ne aldoninte viandon. Ĝenerale en la menuo estos interalie fromaĝo, fruktoj, ovoj.

### RET-programo

La ĉefa RET-programo antaŭvidas diversgradajn kursojn, prelegojn, koncertojn, ekskursojn, sportumadon, naĝadon, diskutadon, lignofajrojn kaj ĉion alian, kion vi proponos kaj (kun)organizos.

Invitu viajn geamikojn, alilandajn gastojn, parencojn. Ni povos akcepti ĝis 100 personoj.

Ni kune festu la 45-an jubileon de Krasnojarska E-klubo!

### Aliĝo

Bonvolu plenigi la aliĝilon, kiu estas en la paĝaro de REU kaj ĝiri la aliĝkotizon al la kasisto Aleksandr Lebedev kun indiko de via nomo kaj urbo.

La pagmanieroj: http://reu.ru/paghoj/pagmanieroj_eo.html.

La unua limdato: la 1-a de marto de la jaro 2020.

**Aliĝkotizo**

Por REU-membroj estas 1300 ₽, por nemembroj 1500 ₽. Infanoj ĝis la 16-jaraĝo inkluzive la aliĝkotizon ne pagas. Por alilandanoj aliĝkotizo estas 25 €.

Ĉiujn demandojn-proponojn bonvolu sendi al Svetlana Smetanina: svsmetanina@yandex.ru.

Alilandanoj ĉe bezono ricevos invitilon por vizo-obteno. Petu invitilon ĉe Svetlana Smetanina.

Malproksima, sed tre gastama Siberio kaj Krasnojarska teritorio atendas vin!

**Bonvenon! Bonvenon! Bonvenon!**

*Ekstera informado*

## Interesiĝas nur informitaj, aŭ Kial gravas ekstera informado pri Esperanto

Foje al mi ŝajnas, ke Esperanton oni mencias minimume fojon ĉiumonate per iuj amaskomunikiloj. Ĉu ankaŭ al vi ŝajnas same? Do — ni eraras. Aŭ tiuj mencioj ne multe helpas por priesperanta informado. Jen venas al mia prelego pri Esperanto junulino kaj diras: "Nur antaŭ tri tagoj mi eksciis pri Esperanto de mia kolego. Mi turnis min al interreto kaj eksciis ankoraŭ iom. Mi ekinteresiĝis — tial mi venis".

**Kiu procento de RF-loĝantaro scias pri Esperanto?**

La tre populara inter gejunuloj kaj programistoj blogo *habr* en la artikolo "Английский vs. Эсперанто: за кем будущее?" ( https://m.habr.com/ru/company/englishdom/blog/446842/ ) asertas, ke unu el malfavoraj por estonto de Esperanto faktoj estas ke pri ĝi scias nur 40% el loĝantaro de evoluigitaj eŭropaj landoj (Francio kaj Germanio), sed en slavaj landoj eĉ multe malpli. Interese, kiun procentaĵoj konsistigas la informitoj en Rusio? Ĉu 5? Eble, 3? El informitoj kiom da ekinteresiĝis? El interesiĝintoj kiom da eklernis? El eklernintoj kiom da finlernis? El finlernintoj kiom da sin montris al ni? El nin trovintoj kiom da venis al la Movado? Ĉe ĉiu paŝo — perdoj kaj perdoj. Kaj en la bazo de tiu perdoĉeno lokiĝas informado. Homoj ne povas ekinteresiĝi pri tio, kio ne atingas ilian informkampon.

Ĝuste pro foresto de klera kaj vasta informado nia lando prezentiĝas kiel malverda dezerto. La raraj komunumoj kaj unuopuloj estas nur restaĵoj de la antaŭa sistemo.

Sed ja nia lingvo kaj nia komunumo estas valora trezoro, kiu povus riĉigi la vivon de multaj homoj — tion ni scias laŭ la propra sperto. Kiel eblas malgrandigi tiun distancegon inter ni kaj tiuj, kiuj, ne sciante pri ni, nin bezonas? Necesas informadi pri ni kaj niaj valoraĵoj.

Manieroj informi multas. Ĉu ni jam provis ĉiujn? Ĉu ni konas ĉiujn? Ne. Necesas analizi inform-eblojn de niaj aktivuloj. Necesas konsideri specifikaĵojn de ĉiu regiono. Necesas disvastigi kaj uzi spertojn de sukcesintoj. Necesas pensi kune, serĉi kune, agi kune kaj konkorde.




Tial en la Estraro de REU dum la Tiĥvina REU-konferenco aperis delonge forgesita (aŭ eĉ neniam ekzistanta inter labordirektoj de niaj tutlandaj Esperantaj organizaĵoj) laborbranĉo "Ekstera informado". Tial la lernojaron malfermis ILEI/REU-projekto "Unu leciono Esperanto por lernantoj". Kaj tial samtempe venis al vi la VK-grupo "Informu! " https://vk.com/informado .

**"Informu!" – estas via resurso por popularigo de Esperanto,**
**aŭ Raportu kaj kontribuu al la komuna porinforma trezorejo!**

La 1-an de septembro 2019 en la socia reto "V Kontakte" startis nova grupo "Informu!" https://vk.com/informado, dediĉita strikte al la temo "informado pri Esperanto al neesperanta

loĝantaro de Rusio ”. Al tiuspeca informado rilatas unuavice konscia agado de esperantistoj cele popularigi Esperanton, sed ankaŭ ajnaj materialoj pri Esperanto de iuj ajn aŭtoroj, sinturnantaj al vasta publiko.

La grupo havas du celojn: kolekti materialojn, rilatajn al la temo, kaj helpi al poresperantaj agantoj ĝuste, aktuale kaj efike informi pri Esperanto.

Ĉar popularigi Esperanton rajtas kaj povas ajna homo — ne nur esperantisto — parto de materialoj en la grupo estas ruslingva. Alvorte ni rimarku, ke ju pli da neesperantistoj klere popularigos Esperanton, des pli bone. Ekzemple, ajna preparita homo povus prezenti Esperanton dum lingvaj festivaloj en la urboj, kie ne estas esperantistoj. Dume tiuj kazoj estas tre raraj, do, ni devas strebi multigi ilin.
Dum du monatoj de sia aktiva ekzisto la VK-grupo “Informu!” akumulis multajn rakontojn pri popularigaj Esperanto-eventoj, okazintaj en Rusio ekde julio ĝis la fino de oktobro 2019. Tiuj eventoj povas servi kiel entuziasmigaj ekzemploj por homoj, kiuj ne kuraĝis aŭ pigris ekagi memstare. La grupo jam havas konsiderindan kvanton da materialoj, inkluzive pretajn bild-prezentaĵojn, kiuj povus helpi komencantajn aŭ rutinajn popularigemulojn krei freŝajn proprajn elpaŝojn. Indas diri, ke la kampo de ekstera informado estas tre vasta kaj riĉigi la enhavon de la grupo eblas senlime.

Mi alvokas ĉiujn esperantistojn ĉe ĉiu sciata aŭ mem organizata informkazo rakonti pri ĝi en la grupo kaj kontribui per taŭgaj materialoj la temaron de “Pridiskutoj” en la grupo.

Dum du monatoj al la grupo aliĝis nur 85 homoj. Ni esperu, ke tiu ĉi mizera kvanto da interesitoj atestas ne pri malemo de rusia esperantistaro popularigi Esperanton, sed pri nescio de multaj aktivuloj pri ekzisto de la grupo. Venu, aliĝu, verku, komentu: prenu vian utilon kaj estu utila mem sur la agadkampo, plej aktuala nuntempe: informado de eksteresperantista rusia loĝantaro pri Esperanto!

**Nia tram’, kolorigita je koloro de espero,**
**aŭ Tutrusia projekto de ILEI/REU**
**“Unu leciono pri Esperanto por lernantoj”, septembro-oktobro 2019**

Ideo de la projekto “Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejano” (jes, la origina nomo estas tia) aparetenas al germana esperantisto, kiu proponis ĝin por ILEI kiel tutmondan projekton. Estis preparita minimuma dokumentaro — kiun eblas legi en Esperanto kaj en la rusa en la vK-grupo “Informu!”. Ni iom adaptis la proponon al kondiĉoj de Rusio, intercetere, vastiĝinte la aĝlimojn de la konsumantoj ĝis 21 jaroj, konsiderante ne nur lernejanojn, sed ankaŭ studentojn. Ne klaras, kiel funkciis la projekto en la ILEI-mondo, sed pri la nia — finiĝinta la 31an de oktobro, ni povas raporti precise.

Komence ni emfazu, ke la projekto estas pure kleriga: ĝi ne celas kolekton de grupo por instrui Esperanton. Iu diros: kial ni perdu tempon sen havi la intencon poste instrui dezirantojn? Tial: se vi klere informos, la aŭskultantoj ekaŭdos pri Esperanto pozitive, due, eble iam rememoros tiun bonan impreson kaj ekdeziros reveni al la temo. Ĉu vi scias, kiom da homoj “eliris el la tramo”? Pli ĝuste: “eliris el la «Tramo»”? Multaj. «Tramo» estas magazino de porinfana avangardo, aperanta en 90aj jaroj eldonkvante pli ol 2 milionoj da ekzempleroj, kie aperis bonhumura rakonto pri Esperanto de la eldonisto-esperantisto Tim Sobakin (Andrej Ivanov). Kaj ĝis nun al la demando “De kie vi eksciis pri Esperanto?” homoj de diversaj generacioj respondas: “El la «Tramo»”. Jen la ekzemplo de modela propagando!



Karavano. Vilagho Algash

**Nun — pri nia projekto “Unu lecino…”. Ĝi daŭris ekde la 1a de septembro ĝis la 31a de oktobro 2019.**
**La ĝenerala statistiko: 12 instruantoj faris 27 lecionojn de Esperanto (el kiuj — 11 po 15 minutoj, aliaj — po 40-45 minutoj) en 15 klerigejoj de 9 urboj sume por 666 lernantoj de la 5-11aj klasoj kaj studentoj aĝaj ĝis 21 jaroj.**



Roman Ralko

Diverse reprezentiĝis ses el ok rusiaj regionoj (ne partoprenis Nord-Kaŭkazio kaj Uralo): de unu leciono en Nord-Okcidento, Siberio kaj Fororiento tra du en Sudo kaj kvar en Centro al 18 en Volgio. Pli detale: **en Ĉeboksaro okazis 17 prezentoj por 408 lernejanoj kaj studentoj**, en Samaro — unu kun 28 lernejanoj.

Ne mirindas, ke en tiu ĉi agado furoras Ĉeboksaro. Aleksandr Blinov dum ĉ. 30 jaroj senlace kaj seninterrompe popularigas Esperanton en la urbo kaj respubliko. Eblas kun certeco diri, ke dank’al lia entuziasmo kaj kapablo inteligente kunlabori kun la ŝtataj strukturoj Ĉuvaŝio estas tereno, la plej malferma al Esperantaj iniciatoj kaj do la plej Esperante informita en la tuta lando.

Ne hazarde ĝuste ĉi tie, apud Aleksandro, elkreskis alia fortegulo – la 17-jara 11-klasano ***Dmitrij Timin*****, kiu okazigis 14 prezentaĵojn en 4 lernejoj por 315 lernejanoj**. Ni aplaŭdu ankaŭ al la 16-jara 10-klasano ***Matvej Blinov***, kiu kuraĝis debuti antaŭ 28 sepklasanoj surfone de la urba aktivado por la projekto.

Partopreno de junularo estas grava kaj tre ĝojiga trajto de la tuta evento. La unua hirundo estis la 25-jara MASIano ***Ivan Sarkisov*** (Moskvo), kiu malfermis la projekton, prezentinte Esperanton en la lernejo "Intelektulo". ***Artemij Ĉirkovskij*** (24 j) prelegis al studentoj-filologoj de sia universitato ITMO (Sankt-Peterburgo), ***Viktor Lagutin*** (26 j) elpaŝis en Fororienta ŝtata scienca biblioteko. Kaj al teamo de lernejanoj fine de oktobro aldoniĝas la plej juna populariganto — 15-jara MASIano ***Roman Ralko*** (Moskvo). Kiel ponto inter la junuloj kaj spertuloj staras la novulo 37-jara MASIano ***Dmitrij Ĵuravljov*** (u. Volgogrado). Kaj nun — la brava malnova gvardio: ***Aleksandr Blinov*** (Ĉeboksaro), ***Jelena Kuznecova*** (Samaro), ***Eŭgeno Bojĉin*** (Ĥabarovsko), ***Ikar Akimenko*** (Barnaul) kaj ***Irina Gonĉarova*** (Moskvo, MEA MASI).

Ni sincere danku niajn aktivulojn, preskaŭ ĉiu el kiuj havis personajn malfacilaĵojn por atingi la celon — fari klerigan lecionon pri Esperanto por ekstera publiko. Necesis havi deziron, impeton kaj volon por plenumi la taskon. Ili superis ĉiujn obstaklojn kaj venkis. Ĉiuj 12 homoj skribis, ke pretas prezenti Esperanton denove kaj denove.




Do — la okazo venos. Tra la jaro, helpante unu la alian, ankaŭ pere de la VK-grupo "Informu", ni trejniĝu, prezentante Esperanton ĉeokaze kaj preparante sin por la sekva ondo de la projekto. Ĝi revenos en septembro-oktobro 2020, kaj ni celu, ke ankaŭ aliaj homoj kaj aliaj urboj aliĝu al ĝi, kaj ke certe partoprenu ĝin ĉiuj rusiaj regionoj.

***Irina Gonĉarova,***
*respondeculo de REU pri ekstera informado,*
*gvidanto de la projekto "Unu leciono pri Esperanto por lernantoj",*
*administranto de la VK-grupo "Informu!"*
mirinda.strigo@gmail.com

## *Decidoj de la Estraro*

### Protokolo №3 de la Estrara decido

**Dato:** Moskvo, 07.11.2019
**Voĉdonado:** reta
**Voĉdonis:**
A. Lebedev, S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Mitin.
**Tagordo / temo:**
Pri kunorganizo de Internacia Kongreso de Blindaj Esperantidtoj en Rusio en 2020.

Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (=LIBE) akceptis decidon organizi vican IKBEn (Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj) en Rusio, Moskvo fine de junio — komence de julio de la 2020-a jaro. La grupo de rusiaj esperantistoj-blinduloj ĉekape kun Anatolo Masenko turnis sin al Svetlana Smetanina kun peto, ke REU iĝu kunorganizanto de la Kongreso kaj helpu en diversaj direktoj de la prepara periodo kaj ankaŭ dumkongrese.
**Decidoj:**
1) Subteni la okazigon de IKBE-2020 en Rusio per informaj kaj organizaj fortoj de REU.
2) Aprobi eniron de Svetlana Smetanina en Organizan komitaton de IKBE-2020.
**Rezultoj de la voĉdonado:**
por: 5;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.
Prezidanto de REU: A. Lebedev.
Vicprezidantoj de REU: S. Smetanina, N. Gudskov.

### Protokolo №4 de la Estrara decido

**Dato:** Moskvo, 08.11.2019
**Voĉdonado:** reta
**Voĉdonis:**
A. Lebedev, N. Gudskov, S. Smetanina, I. Gonĉarova, A. Mitin.
**Tagordo / temo:**
Pri elspezo por printi kaj dissendi dankofoliojn pri la projekto «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj».
**Decidoj:**
Pripagi el la kaso de REU printadon kaj dissendon de dankofolioj pri la projekto «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj».

**Rezultoj de la voĉdonado:**
por: 3;
kontraŭ: 1;
sin detenis: 1.
Prezidanto de REU: A. Lebedev.
Vicprezidantoj de REU: S. Smetanina, N. Gudskov.

## Protokolo №5 de la Estrara decido

**Dato:** Moskvo, 08.11.2019
**Voĉdonado:** reta
**Voĉdonis:**
A. Lebedev, S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Mitin.
**Tagordo / temo:**
Pridiskuto de la Rusiaj Esperanto-Tagoj — 2020 kaj formado de la Organiza komitato.
**Decidoj:**
Formi organizan komitaton de RET-2020 en konsisto: Svetlana Smetanina, Aleksandr Lebedev, Evelina Sokolova. Ĉe bezono O. K. povas konsulti kaj engaĝi aliajn helpantojn.
**Rezultoj de la voĉdonado:**
por: 5;
kontraŭ:0 ;
sin detenis: 0.
Prezidanto de REU: A. Lebedev.
Vicprezidantoj de REU: S. Smetanina, N. Gudskov.



Habarovsk

## Protokolo №6 de la Estrara decido

**Dato:** Moskvo, 08.11.2019
**Voĉdonado:** reta
**Voĉdonis:**
A. Lebedev, S. Smetanina, N. Gudskov,
I. Gonĉarova, A. Mitin.
**Tagordo / temo:**
Dankesprimo al kontribuintoj al la projekto «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj».
**Decidoj:**
**1) Pro popularigo de Esperanto enkadre de la projekto «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj», septembro–oktobro 2019, danki kaj enmanigi dankfoliojn al:**

- **Ikar Akimenko (Siberio, u. Barnaul) pro prezento de Esperanto en Altaja ŝtata memor-muzeo de G. S. Titov;**
- **Aleksandr Blinov (Volgio, u. Ĉeboksaro) pro okazigo de du prelegoj en Ĉuvaŝa ŝtata pedagogia universitato I. J. Jakovlev por studentoj de filologia fakultato;**
- **Matvej Blinov (Volgio, u. Ĉeboksaro) pro prezento de Esperanto al lernantoj de la gimnazio №5;**
- **Eŭgeno Bojĉin (Fora Oriento, u. Ĥabarovsko) pro prezento de Esperanto al studentoj en la Fororienta ŝtata scienca biblioteko;**
- **Artemij Ĉirkovskij (Nord-Okcidento, u. Sankt-Peterburgo) pro prezento de Esperanto al studentoj de ITMO;**
- **Dmitrij Ĵuravljov (Sudo, Volgogrado, MEA MASI) pro prezento de Esperanto al lernantoj de la gimnazio №14 kaj al gejunuloj en la regiona biblioteko «Gorjkij»;**
- **Irina Gonĉarova (Centro, Moskvo, MEA MASI) pro prezento de Esperanto al lernejanoj de fakultativo pri lingvistiko ĉe RGGU;**
- **Jelena Kuznecova (Volgio, Samaro) pro prezento de Esperanto al lernantoj de la lernejo №91;**
- **Viktor Lagutin (Fora Oriento, u. Ĥabarovsko) pro prezento de Esperanto al studentoj en la Fororienta ŝtata scienca biblioteko;**
- **Roman Ralko (Centro, Moskvo, MEA MASI) pro prezento de Esperanto al lernantoj de la lernejo №444;**
- **Ivan Sarkisov (Centro, Moskvo, MEA MASI) pro prezento de Esperanto al lernantoj de la lernejo «Intelektulo»;**
- **Dmitrij Timin (Volgio, u. Ĉeboksaro) pro okazigo de 14 prezentaĵoj en 4 lernejoj al 315 lernejanoj.**



Volgograd

**2) Pro elstara kontribuo al la projekto premii Dmitrij Timin per la libro de M. Bronŝtejn «Mi stelojn jungis al revado».**
3) Konsideri la pilotan fazon de la tutlanda ILEI/REU-projekto «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj» sukcesa.
**Rezultoj de la voĉdonado:**
por: 5;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.
Prezidanto de REU: A. Lebedev.
Vicprezidantoj de REU: S. Smetanina, N. Gudskov.



Dmitrij Timin

## Internacia Forumo en Sankt-Peterburgo: partopreno de REU kaj perspektivoj pri UK en Rusio




Aleksandra Sifuentes Garsia, Clay Maghales, Svetlana Smetanina

La 9-11 de oktobro 2019 en Ekspo-Centro de Sankt-Peterburgo pasis Internacia Forumo, organizita de la firmao «K.I.T. Group GmbH».
La celo de la aranĝo estis formado de dialogo inter estraroj de naciaj kaj internaciaj asocioj kun ŝtataj kaj komercaj institucioj en sfero de komerca turismo kaj organizado de kongresoj – ekspozicioj – asambleoj - konferencoj. Simila formato de profesia interkomunikado de fakaj asocioj estis aranĝita la unuan fojon.
Estis unika ebleco por partoprenantoj:
– ekscii pri strategio de disvolvo de komerca turismo en Sankt-Peterburgo, pri kompetentaj personoj kaj organizoj, efektivigantaj ĝian realigon;
– ellerni rimedojn de kunlaboro de la Registaro de Peterburgo kun potencaj naciaj partneroj surbaze de ekzemploj de laboro de kelkaj asocioj;
– persone konatiĝi kun gvidantoj de internaciaj asocioj, ricevi laborkontaktojn, pridiskuti aktualajn problemojn de regiona kaj tutmonda interlaboro, kontrakti kunajn iniciatojn;
– interŝanĝi spertojn dum labora Seminario.
La Forumon partoprenis gvidantoj de medicinaj asocioj (diversdirektaj), lingva komunikado, komputilistoj, aviadistoj, sciencistoj el Svislando, Germanio, Francio, Grekio, USA k.a.
De la CO de UEA estis invitita konstanta kongresa sekretario Clay Maghales, de REU-Estraro partoprenis mi. La ĉefa temo de nia invitado kaj partopreno estis ebleco far tiu ĉi firmao organizi en Sankt-Peterburgo Universalan Kongreson en la jaro 2023. Dum multaj diskutoj kun la gvidantino de internaciaj projektoj evidentiĝis, ke ĝenerale tio eblas, kaj la ĉefan laboron pri kontaktoj kun la Registaro de Peterburgo kaj aliaj instancoj tiu firmao faros mem.
Ĝi havas riĉan sperton pri similaj internaciaj aranĝoj. Tamen la fina vorto apartenas al la CO de UEA. Temas pri prezoj de ejoj, hoteloj, vizoj, ktp. Kontaktinte kun la ĉefino de la projekto s-no A. Sifuentes Garsia, mi komprenis, ke sen REU ili nenion volas fari kaj restos en densa kontakto kun ni kaj ankaŭ kun Clay, kiu havas ĉefan rolon en la decido prie.
La organizo de la Forumo estis perfekta: bonegaj ejoj por diskutoj kaj kunvenoj, luksaj hoteloj, kafumado, vespermanĝo kun interesaj rakontakompanoj pri tradicioj de rusa kuirarto, ekskurso al la urbo Puŝkin, en Ekaterinan Palacon, vizito de Jusupov-Palaco.
Mi esperas, ke kunlaboro de REU kun tiu firmao daŭros kaj finfine ni havos UKon en Rusio!

***Svetlana Smetanina***

# *Laborplano de la Estraro de REU por la periodo «julio-2019 — julio-2020»*

***Komune farataj taskoj***

- Materialoj por «Ponto», «Cerbe kaj kore», provlegado de ili: Nikolaj Gudskov, Svetlana Smetanina, aliaj estraranoj.
- KER-ekzamenoj: Svetlana Smetanina, Irina Gonĉarova.
- Dissendoj, paĝaro: Aleksandr Mitin, Aleksandr Lebedev.
- Sociretaj grupoj kaj «eventoj»: Aleksandr Mitin, Irina Gonĉarova, Aleksandr Lebedev.

***Laborplano de Aleksandr Lebedev, prezidanto de REU***

**I. Konstantaj kaj longdaŭraj aktivaĵoj:**

- zorgo pri la kaso, akcepto de kotizoj;
- zorgo pri la fonduso «Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev»;
- konstruado de nova versio de REU-paĝaro;
- laŭebla provlegado de «Ponto» kaj «Cerbe kaj kore», ĉe neceso kontribuo al ili per raportoj kaj aliaj tekstoj; reklamado de la revuoj per publikigo de enhavlistoj de novaj kajeroj.

**II. Aktivaĵoj kun kalendare fiksita tempo**

**Aŭgusto — septembro 2019:**

- publikigo de la protokoloj de la REU-Konferenco kaj unua estrara kunsido;
- kreo de dissendolisto por nova Estraro;
- partopreno en intervjuo por «Radio Rossii".

**Oktobro 2019:**

- publikigo de informletero pri RET-2020, lanĉo de aliĝado por ĝi.

**Novembro — decembro 2019:**

- kolekto de laborplanoj de estraranoj;
- verko kaj akcepto de regularo pri Esperantisto de la jaro;
- verko kaj akcepto de decidoj, rilataj al RET kaj IKBE;
- kreo de «eventoj" por RET-2020 en sociretoj VK kaj Facebook;
- ĝiro el Kondratjev-fonduso;
- analizo de elspezoj, provo fari buĝet(et)on por 2020;
- akcepto de Kotizregularo por 2020;
- decido pri Esperantisto de la jaro 2019.

**Januaro 2020:**

- publikigo de raporto pri la kaso por la jaro 2019.

**Junio — julio 2020:**

- okaze de ĉeesto en Moskvo: helpo pri IKBE, renkonto/akompano de partoprenantoj kaj tiel plu,
- partopreno en organizado de RET-2020.

***Laborplano de Smetanina Svetlana, la unua vicperidanto de REU***

1. Konstanta kunlaboro kaj interhelpo pri kolektado de materialoj por la «Ponto» kaj «Cerbe kaj kore».
2. Helpo al la Prezidanto en diversaj laborflankoj (oficialaj dokumentoj, kontaktoj kun Impostejo, Minjusto, aliaj organizoj, kaj tiel plu).
3. Kontaktoj kun alilandaj esperantistoj kaj organizoj. Demandoj, petoj, invitiloj, eventualaj vizitoj. Kompilado de programoj, organizado de ĉiĉeronado.
4. Prizorgo de la Centra regiono.
5. Kunordigo de la klubkunvenoj en «Lev Tolstoj».
6. Daŭra organizado de KER-sesioj en Moskvo kaj eble en aliaj regionoj kaj urboj.
7. Kunlaboro de REU-kun ILEI kaj UEA. Respondo al oficialaj leteroj, petoj, partopreno en onia laboro kaj projektoj. Plifortigo de la landa sekcio. Organizado de staĝoj kaj renkontiĝoj por E-instruistoj kaj E-instruantoj.
8. Kunhelpo kaj kunorganizo de la IKBE en Moskvo (Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj) la 27.06–04.07.2020.
9. Organizado de RET-2020 en Krasnojarsko la 10–19.07.2020.
10. Daŭra esplorado kaj laboro pri la eventuala organizo de SAT-Kongreso kaj UK en Rusio (la 2021-a kaj 2023-a jaroj).
11.

***Laborplano de Nikolaj Gudskov, la dua vicperidanto de REU***

- Eldonado de la revuoj «Ponto» kaj «Cerbe kaj kore».
- Eventuale, eldono de aliaj materialoj (tendarlibretoj k. s.).
- Laŭebla helpo al ĉiuj aliaj estraranoj pri organizaj aferoj laŭ iliaj bezonoj.

***Laborplano de Irina Gonĉarova, REU-respondeculo pri regiona agado***

**Konstantaj taskoj:**

- teni seninterrompan ligon kun ĉiuj regionestroj;
- kuraĝigi, instrukcii, konsili, inspiri regionestrojn agadi en la regionoj;
- atenti kaj subteni regionajn aktivulojn per intereso al iliaj agoj, dankfolioj, premioj kaj tiel plu;
- kolektadi kaj sistemigi informojn pri regiona agado;
- serĉadi dormantajn kaj komencantajn esperantistojn en la regionoj kaj peni engaĝi ilin en la regionan esperantistan komunumon;
- informadi la Estraron de REU, rusian esperantistaron kaj esperantistojn de koncernaj regionoj pri stato de la Esperanto-movado en la regiono kaj en la lando;

-
- resumi la agadon de tiu ĉi laborbranĉo fine de ĉiu duonjaro;
- verki aŭ verkigi artikolojn pri la plej gravaj aŭ interesaj eventoj de la regionoj en la eldonaĵo de REU «Ponto».

### Konkretaj farindaĵoj

**Julio — aŭgusto 2019:**

- trovi anstataŭantojn por regionaj reprezentantoj de REU anstataŭ nefunkciantaj por la regionoj Centro, Sudo, Volgio; instrukcii ilin pri iliaj taskoj; establi kun ili stabilan distancan informinterŝanĝon.

**Septembro — oktobro 2019:**

- kompili liston de Esperanto-aktivaĵoj dum la periodo «aŭgusto-2017 — julio-2019» surbaze de la kvar raportoj, ricevitaj de regionestroj el Fororiento, Norda Kaŭkazio, Nord-Okcidento kaj Uralo okaze de la 30-a Konferenco de REU;
- dezajni, printi kaj dissendi dankfoliojn por regionaj aktivuloj, menciitaj en la raportoj;
- konatiĝi kun novelektitaj regionaj respondeculoj rusian esperantistaron per publikigo de intervjuoj kun ili en REU-eldonaĵo «Ponto»;
- kutimigi regionestrojn publikigi informojn pri agado de iliaj regionoj en speciala VK-grupo «REAgo»;
- aktivigi en regionoj ILEI/REU-projekton «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj» per laboro kun regionaj respondeculoj kaj sendependaj aktivuloj;
- kunlabori kun la nova regionestro de Volgio Jelena Kuznecova (Samaro) pri organizado de la regiona Volgia Esperanto-Renkontiĝo (VER-16), planata por 2–4 de novembro;
- kunlabori kun Jelena Kuznecova pri okazigo de primovada kunveno kun ĉeesto de regionaj reprezentantoj enkadre de la VER-16;
- prepari raporton pri la stato de E-movado en la regionoj por VER-16 kaj raporton pri la projekto «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj», kiun partoprenis ses el ok regionoj de Rusio;
- publikigi ĉiujn informojn pri rusia Esperanto-movado en rusiaj priesperantaj interretresursoj kun mencio de la aktivanta regiono.

**Novembro — decembro 2019:**

- allogi regionojn al la projektoj de la laborbranĉo «Ekstera informado», riĉiĝante la koncernan VK-grupon «Informu!»;
- stimuli regionojn al okazigo de diversaj aranĝoj, dediĉitaj al Zamenhof-tago kaj Tago de Esperanta libro (la 15-a de decembro); prepari revuan informmaterialon pri tiuj aranĝoj;
- prepari primovadan kaj aktivulan kunvenojn enkadre de Novojarsko-5 (u. Barnaulo);
- subteni Novojarskon-5 per propra ĉeesto kaj kontribuo al la primovada programo;
- kolekti raportojn el ĉiuj regionoj pri la duonjara agado (julio-decembro-2019);
- preparadi MASI-renkontiĝon «Apero-14» (Apudmoskvo, Centro, 21–24.02.2020) kaj daŭrigi laboron pri koncepto kaj programo de eventuala MASI-renkontiĝo «Temoj» (Penza, Volgio, 01–05.05.2020);
- publikigi priregionajn materialojn en Esperantaj interretresursoj;
- liveri al «Ponto» materialojn por la rubrikoj: «Regiona agado», «Kluba vivo» kaj similaj.

**Januaro — februaro 2020:**

- finprepari kaj okazigi MASI-renkontiĝon «Apero-14», dediĉitan al 25-jariĝo de MEA MASI (Apudmoskvo, Centro, 21–24.02.2020);
- daŭrigi laboron pri aranĝo de eventuala MASI-renkontiĝo «Temoj» (Penza, Volgio, 01–05.05.2020).

**Marto — julio 2020:**

- prizorgi preparadon de majaj regionaj renkontiĝoj;
- stimuli regionojn okazigi KER-ekzamenojn;
- kontribui okazigon de KER-ekzameno en Moskvo;
- prizorgi preparadon de primovadaj aranĝoj dum RET (Krasnojarsko).

***Laborplano de Irina Gonĉarova, REU-respondeculo pri ekstera informado***

### Konstantaj taskoj:

- klarigi al rusia esperantistaro gravecon de ekstera informado pri Esperanto;
- aktivigi rusiajn esperantistojn agi por informi eksteresperantistan loĝantaron pri Esperanto kaj kutimigi ilin al regula raportado pri koncerna agado;
- engaĝi Esperantan junularon en la informan aktivadon;
- serĉadi ĉiujn materialojn, rilatajn al ekstera informado pri Esperanto en Rusio, inkluzive tiujn, kiuj venas ne de esperantistoj;
- publikigi materialojn, rilatajn al ekstera informado pri Esperanto en Rusio, en VK-grupo «Informu!»;
- helpi per informaj materialoj plej diversaj al Esperanto-popularigantoj, estu ili esperantistoj aŭ ne;
- montri ekzemplojn de sukcesa informado pri Esperanto kaj analizi malfacilaĵojn kaj erarojn de la ekstera informado pri Esperanto;
- lanĉi kaj gvidi tutrusiajn kaj regionajn projektojn, rilatajn popularigon de Esperanto;
- subteni agantojn sur la branĉo de Esperanta popularigo per rimedoj, posedataj de REU;
- gratifiki sukcesajn agantojn sur la branĉo de Esperanta popularigo per dankfilioj kaj aliaj rimedoj, posedataj de REU;
- fine de ĉiu duonjaro resumi rezultojn de la laboro;
- verki aŭ verkigi artikolojn pri la plej gravaj aŭ interesaj eventoj pri Esperanto-informado en la eldonaĵo de REU «Ponto».

### Konkretaj farindaĵoj

**Julio — aŭgusto 2019:**

- klopodi pri liverado de intervjuotoj por la radiostacio «Sputnik» por la elsendo, dediĉita al naskiĝtago de Esperanto;
- kolektado de aliaj meterialoj, aperintaj en amaskomunikiloj lige kun la Tago de Esperanto.

**Septembro — oktobro 2019:**

- lanĉo de la projekto «Informu!», dediĉita al popularigo de Esperanto en Rusio, kaj malfermo la 1-an de septembro 2019 de la koncerna VK-grupo «Informu!»; regula moderigado kaj plenigado de la grupo; laboro por konsciigo de rusia esperantistaro pri ekzisto kaj utilo de la VK-grupo «Informu!» kaj aktivigo de homoj en/por ĝi;
- malfermo de la Fb-grupo «Informu!», dediĉita al ekstera popularigo de Esperanto en Rusio;
- lanĉo kaj gvidado de la tutrusia ILEI/REU-projekto «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj»; laboro kun regionaj respondeculoj kaj sendependaj aktivuloj, speciale kun gejunuloj-memlernantoj, por engaĝi ilin en la ILEI/REU-projekton «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj»;
- okazigo de kvin prezentoj de Esperanto en Moskvo (du far' de Irina Gonĉarova: en Moskva centro de seninterrompa matematika edukado enkadre de la fakultativo pri lingvistiko ĉe RGGU kaj en la moskva lernejo pri la angla lingvo «NISE»; du far'de Roman Ralko en la akademia klaso de moskva lernejo №444; unu far'de Ivan Sarkisov ĉe la internejo «Intelektulo»);
- preparo de dankfolioj por la kontribuantoj al la projekto «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj»;
- skriba resumo de la projekto «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj»;
- prizorgo de informado pri popularigo de Esperanto enkadre de lingvaj festivaloj en u. Ĉeboksaro kaj u. Sankt-Peterburgo.

**Novembro — decembro 2019:**

- verko kaj publikigo de artikolo por «Ponto» pri la projekto «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj»;
- rakonto pri la projekto «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj» dum la regiona aranĝo «VER-16» kaj planado de ĝia evoluo en Volgio kaj aliaj regionoj en la jaro 2020;
- preparo kaj okazigo de la 14-a Moslva lingva festivalo kaj prizorgo de maksimuma Esperanto-popularigo ene de ĝi;
- instigo de regionoj okazigi diversajn aranĝojn por ekstera publiko, dediĉitaj al Zamenhof-tago kaj Tago de Esperanta libro (la 15-a de decembro); preparo de revua informmaterialo pri tiuj aranĝoj;
- konsciigi partoprenontojn de la regionaj renkontiĝoj VER-16 (u. Samaro) kaj Novojarsko-5 (u. Barnaulo) pri utilo kaj bezono de ilia kunlaboro kun la projektoj «Informu!» kaj «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj».

**Januaro — februaro 2020:**

- startigo de nova temo en «Informu!»: festoj en tutmonda kalendaro, taŭgaj por popularigo de Esperanto, kaj tezoj, montrantaj ligon inter la motivdato kaj Esperanta movado (teorio);
- lanĉo de esperantista agado por la tutrusia projekto: «Kiel ni uzas la motiv-festojn por popularigo de Esperanto» (labora titolo).

**Marto — aprilo 2020:**

- ellaboro de la projekto «Informado pri Esperanto per interreto» (labora nomo) kun maksimuma engaĝo de retumantoj-gejunuloj, ankaŭ neesperantistoj (koncepto, agaddirektoj, teknikaj ebloj, homaj resursoj kaj tiel plu);
- lanĉo de la projekto «Informado pri Esperanto en interreto»;
- startigo de novaj ruslingvaj Esperanto-popularigaj programoj en la Jutub-kanalo «Esperanto: la unua kanalo»).

**Majo — junio 2020:**

- evoluigo de esperantista agado por la tutrusia projekto: «Kiel ni uzas la motiv-festojn por popularigo de Esperanto»;
- evoluigo de agaddirektoj, elektitaj por la projekto «Informado pri Esperanto per interreto»;
- preparlaboro por la sezono de someraj lernejanaj tendaroj kaj de multtemaj popol-festivaloj, kie endas popularigi Esperanton.

**Julio — aŭgusto 2020:**

- daŭrigo de la projektoj «Kiel ni uzas la motiv-festojn por popularigo de Esperanto» kaj «Informado pri Esperanto per interreto»;
- prezentoj de Esperanto en someraj lernejanaj tendaroj kaj popol-festivaloj;
- prepariĝo al la dua ŝtupo de la tutrusia projekto «Unu leciono pri Esperanto por lernanto».

**Septembro — oktobro 2020:**

- resumo de ĉiuj someraj aktivadoj, speciale de tiu pri prezentoj de Esperanto en someraj lernejanaj tendaroj kaj popol-festivaloj;
- startigo de la dua ŝtupo de la tutrusia projekto «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj»;
- daŭrigo de la projektoj «Kiel ni uzas la motiv-festojn por popularigo de Esperanto» kaj «Informado pri Esperanto per interreto».
-

### *Laborplano de Aleksandr Mitin, estrarano*

- 1. Finfari la laboron pri "perdintaj" dumvivaj membroj, prepari la liston kun la "netroveblaj" por estonta decido de la estraro *(ĝis la fino de 2019).*
- 2. Registri membrojn de REU, kolekti kaj ordigi kontaktan informon. Fari dissendojn kun gravaj novaĵoj kaj memorigoj pri re-aliĝo.
- 3. Prizorgi la paĝojn de REU en socireto (VK, FB), pripensi novajn eblecojn por tiuj paĝoj kaj eblaj novaj lokoj de interreto. Helpi uzantojn de reu.ru kun aldono de novaĵoj kaj okazaĵoj.
- 4. *(Depende de la inspiro)* Proponi ideojn kaj meditaĵojn por pridiskuto inter la Estraro aŭ la Konferenco.
-

# Tri tagoj en Samara



La 2-an – 4-an de novembro 2019 en la urbo Samara pasis la **16-a Volgia Esperanto-renkontiĝo (VER).** VER'oj estas aranĝoj, kiuj okazas en diversaj urboj de apudvolga regiono. La numero «16» aludas tradiciecon de la renkontiĝo, sed, fakte, la antaŭa, 15-a VER okazis antaŭ multaj jaroj, kaj la tradicio rompiĝis. La 16-a VER estas provo renaskigi la aranĝon, ĝi estis longe kaj kun grandaj esperoj atendata, kaj pro tio ne preterlasebla.

Por mi la urbo Samara, la renkontiĝo kaj la organizantoj estis novaj, do mi ne sciis, kion atendi, des pli anticipa informo ne multis (kion eblas konsideri ioma manko). Rezulte evidentiĝis: perfekta surloka organizado, riĉa Esperanta programo kaj mirinde harmonia partopreno de esperantistoj en urba festivalo.

La solena malfermo en la unua tago la 2-an de novembro estis vere solena — kun kantado de Esperanto-himno. Post la kantado la organizantino Jelena Kuznecova prezentis samarajn esperantistojn. Poste sekvis salutvortoj de gastoj. Al VER venis esperantistoj el Uljanovsk, Dimitrovgrad, Volgograd, Moskvo (kaj la regiono) kaj, kompreneble, el Samara.

Partoprenantoj de VER sendis solidarec-mesaĝon al samtempe okazanta en Havano (Kubo) internacia aranĝo — la 3-a Kontraŭ-imperiisma solidarec-kunveno por demokrateco kaj kontraŭ nova liberismo. La mesaĝo estis prezentita por aprobo de partoprenantoj dum la solena malfermo, la tekston voĉlegis Marija Prilepskaja.




Gravan lokon en la unua tago okupis Ronda tablo pri movado. Partoprenantoj rakontis pri Esperanto-agado en siaj regionoj, mi rakontis pri kurantaj aferoj en la Estraro de REU, Irina Gonĉarova rakontis pri informado kaj la projekto «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj». Estis provo per skajpo partoprenigi en la Ronda tablo aliurbanojn, kiuj ne povis veni al VER. Tio sukcesis ne plene: homoj parte aŭskultis la diskuton, sed ne multe parolis.

Poste dum la tago okazis kelkaj prelegoj: pri samaraj korespondaj kursoj, pri historio de E-movado en Samara regiono, pri vortaro de Kondratjev. Kaj vespere ni ludis kaj kantis. La ludo «Kio, kie, kiam» streĉis nian memoron kaj ekzercis la cerbojn, la demandoj estis sufiĉe komplikaj. Post la ludo okazis koncerto de Aleksandr Ĥrustalov — la plej ĝuinda programero de la tago. Nokte la koncerto glate transformiĝis al komuna ludado-kantado.

La dua tago de la renkontiĝo komenciĝis de interesa prelego de M. Prilepskaja pri Civila milito en Hispanio. La temo de la prelego estis daŭrigita dum ekskurso tra la urbo, kiu okazis poste. Dum la ekskurso ni vizitis steleon, starigitan dediĉe al samaranoj-internaciistoj, kiuj partoprenis en la hispana Civila milito. La steleo estis starigita dank' al klopodoj de M. Prilepskaja.

Meztage okazis kerna programero — partopreno de VER en la urba festivalo «Arta nokto». Enkadre de «Arta nokto» en diversaj lokoj de Samara pasis prelegoj, koncertoj, majstroklasoj. Inter tiuj estis ankaŭ kelkaj prelegoj pri Esperanto en Samara publika biblioteko. La priesperantan programon malfermis prelego de Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova pri ĝeneralaj aferoj rilate al Esperanto-movado en la mondo, pri redaktora agado kaj la eldonejo «Impeto». En paŭzo Irina Gonĉarova enmanigis diplomojn al Esperanto-aktivuloj, kaj lokano Anatolij Radaev gitarludis kaj kantis paron da «Oraj kantoj». Sekvis mirige entuziasma prelego de profesoro V. Ionesov pri praktikaj aplikoj de Esperanto. Funkciis ekspozicio de libroj kaj esperantaĵoj. Kvankam plejparte homoj, kiuj venis en la bibliotekon, estis esperantistoj, tamen estis ankaŭ kelkaj gastoj de ekstere. Ni esperu, ke la prelegoj inspiris kaj interesis ilin.



Post la programo en la Samara publika biblioteko ni disiĝis por pasigi la restaĵon de la tago laŭ siaj gustoj. Eblis viziti eventojn de «Arta nokto», promeni kaj tiel plu. Mi promenis tra Samara kaj vizitis la urban filharmonion, kie ĝuis la koncerton «Trezoroj de keltoj». Post la koncerto mi finis la tagon, bierumante en drinkejo, kie gustumis Ĵiguljovskojon kaj kankrojn.

En la fina, tria tago de VER estis nur kelkaj matenaj programeroj, el kiuj plej interesis min prelego de Valentin Melnikov pri Esperanto-poezio kaj aparte impresis la deklamita de li «Ebrio» de Ŭíljam Old.

Posttagmeze la 4-an de novembro la renkontiĝo finiĝis, sed ne finiĝis mia tempo en Samara. Duontagon ĝis la trajno mi pasigis, promenante tra la urbo, trovis kaj vizitis vegetaran kafejon, vizitis kaj plene traveturis Samaran metroon, traveturis dekduon da kilometroj per loka elektrotrajno.

La 16-an Volgian Esperanto-renkontiĝon partoprenis plentempe ĉirkaŭ 30 homoj. Kelkaj personoj venis pornelonge, por apartaj programeroj. Laŭ mi, la aranĝo plene sukcesis kaj superis ĉiujn eblajn atendojn. La ĉeforganizantino Jelena Kuznecova estis tre zorgema kaj sukcesis fari, ke la programo fluis senstumble kaj laŭ horaro. Nun estas defio por aliaj volgiaj urboj: kiu aranĝos la sekvan VER-17?

***Aleksandr Lebedev***

**Solidarec-mesaĝo al la 3-a Kontraŭ-imperiisma solidarec-kunveno por demokrateco kaj kontraŭ nova liberismo (okazinta de la 1-a ĝis la 3-a de novembro 2019 en Havano, Kubo):**

Ni, partoprenantoj de la Volgia Esperantista renkontiĝo VER-16, subtenas la decidojn de la 3-a Kontraŭ – imperiisma solidarec-kunveno por demokrateco kaj kontraŭ nova liberismo. Ni estas solidaraj kun la kuba popolo en ĝia lukto kontraŭ blokado flanke de Usono kaj esprimas konvinkon, ke malgraŭ ĉio Kubo daŭrigos la sukcesan konstruadon de socialisma socio kun helpo de ĉiuj progresemaj fortoj de la mondo. Kune ni venkos!
¡Viva Cuba libre!

# Lingva festivalo en Peterburgo

La 27an de oktobro en Sankt-Peterburgo okazis la 13a Lingva Festivalo, organizita de lokaj aktivuloj de REU V. Ivanov kaj S. Andrejsons. La aranĝon ĉi-jare unuafoje gastigis la peterburga filio de la Supera Lernejo pri Ekonomiko.



Esperanto estis prezentita unufoje, sed en la plej granda salono. Prezentis la internacian lingvon Vjaĉeslav Ivanov. Krom tio okazis almenaŭ du Esperantaj eventoj: German Dudĉenko prelegis pri tri esperantoidoj el la pasinta jarcento (Ido, Omo kaj Nov-Esperanto) kaj Miĥail Kolodin gvidis paroligan kunvenon „Klubo de Esperanto“, kiun ofte vizitas nur aktivaj esperantistoj, sed nun estis ankaŭ kelkaj reprezentantoj de la celgrupo: nome komencantoj kaj memstaraj lernantoj de la lingvo.

Ĝenerale la festivalon ĉeestis ĉirkaŭ kvarcent personoj, okazis prezentoj de 37 lingvoj kaj dekkelk aliaj eventoj (en ses blokoj po 11 programeroj); ĉi-jare neniu el la programeroj ripetiĝis en la programo.

***Vjaĉeslav Ivanov,***

*organizanto de lingvaj festivaloj en Sankt-Peterburgo*

# Post TEMoj

Mi atingis la novajn TEMojn
Malgraŭ timo pri l' veturad'
Kaj forgesis tuj la problemojn
En flueg' de l' impreskaskad'.




Esperanto min plu konvinkis
Pri magio de sia ver'.
Dum semajno mi ĝue trinkis
Vivbalzamon sur verda ter'.



Ĉe penado,luktem', rezistoj
Kontraŭ prem' de l' malica sort'
La kuniĝ' de esperantistoj
Vivamigas per sia fort'.

Metiejo, koncert', prelego –
Floris TEMoj, plijunis kor',
Kaj kabtadis la dezirego
Vivi plu en pigrula plor'.



Skrjabim, Mozart inspire sonis,
Por traduk' venis forta vok'.
La amikan etoson kronis
Varmo esti sur ĝusta lok'.

La tendaro inter tendaroj
Por la olda hejmsidulin'!
Se mi vivos plu post kvin jaroj,
Mi je ĝoj rememoros ĝin.

***Klara Ilutoviĉ***

*Regiona agado*

# Aktivuloj: Jelena Kuznecova, kunordiganto de esperantista movado en Volgio por julio-2019-julio 2021

***Dum la 30-a REU-Konferenco, okazinta julie en Tiĥvin, samaranino Jelena Kuznecova senhezite konsentis iĝi nova kunordiganto de Volgio. Irina Gonĉarova, respondeculo pri regiona agado en la Estraro de REU, intervjuas ŝin antaŭ VER-16 — granda kaj grava por Volgio evento.***

***1/ Lena, vi estas esperantstino ekde 2001a jaro. Kiun organizan sperton vi jam havas?***
Nia samara klubo dum pluraj jaroj estis sufiĉe multnombra kaj aktiva. Kaj ni jam dufoje organizis Volgiajn Esperanto-Renkontiĝojn — en 2009 kaj 2012 jaroj.

***2/ Kial vi decidis surpreni la respondecan postenon de REU-reprezentanto en via granda regiono?***
Ŝajnas, venis mia tempo**.**



***3/ Kio estas REU por vi? Kiun helpon vi jam havis aŭ atendas de REU?***
REU estas organizaĵo, kiu povas subteni esperantistojn en rilatoj kun oficialaj instancoj. De REU ni bezonas informan subtenon.

***4/ Vi intencas kontribui al la ĉefa tutrusia REU-projekto de septembro-oktobro-2019 "Unu leciono pri Esperanto por lernantoj". Ĉu vi bezonis oficialan leteron por lerneja administraro?***
Mi ne bezonas iujn oficialajn dokumntojn de REU: pro mia laboro mi mem havas personajn kontaktojn kun lernejestroj. Kaj mi havas multajn eblojn okazigi lecionojn en lernejoj. Sed, bedaŭrinde, mi ne havas tempon por tio. Mi esperas, ke la projekto daŭros ankaŭ novembre-decembre.

***5/ Kion vi planas fari por establi esperantistan movadon en via regiono?***
La unua planata afero estas Volgia Esperanto-Regiona renkontiĝo VER-16, kiu paŭzis dum sep jaroj. Mi decidis restarigi ĝin. Certe, ne sola, sed kun aliaj samaraj aktivuloj: Marija Aleksejevna Prilepskaja, Jelena Poljanskaja kaj aliaj — kaj kun helpo de partoprenantoj, inter kiuj ni atendas, krom volgiaj esperantistoj, multajn homojn el aliaj regionoj, ekzemple, moskvajn aktivulojn.

***6/ Sed kial vi paŭzis tiom longe? Kio ŝanĝiĝis?***

Ni esperis, ke iu alia volgia urbo akceptos la stafeton kaj organizos la renkontiĝon, sed vane. Kaj kiam pasintmaje, dum la Lingva Trejnado en Jekaterinburgo, vi proponis organizi VERon, mi komprenis, ke tion devas denove fari Samara. Kaj tio inspiris min agi.

***7/ Kion vi celas, reorganizante la VERon?***
Mi deziris iom movi homojn, kolekti kaj aktivigi iamajn klubanojn, eble, trovi novajn lernantojn de Esperanto. Jam dum preparado de la aranĝo ni ekscias tiom da interesaj faktoj kaj elfosis verajn valoraĵon.

***8/ Kio estas planata en la programo de VER por progresigi Esperanto-movadon en la regiono? Kiujn ŝanĝojn en la regiono vi ŝatus sperti post la aranĝo?***
Al nia renkontiĝo venos la plej famaj aktivuloj kaj la plej bonaj instruistoj de la lando. Movadajn problemojn ni pridiskutos dum la konferenco, kiun ni nomis "Ronda Tablo". Ĝin partoprenos eĉ reprezentanto de Fora Oriento Eŭgeno Bojĉin, bedaŭrinde, nur skajpe, sed ankaŭ tio nemalbonas. Ni ŝatus, preninte sperton de aliaj, ricevi inspiron kaj novajn fortojn por plia laboro. Mi esperas, ke la aranĝoj kiel VER, fariĝos en Volgio pli oftaj kaj okazados en diversaj urboj de la regiono.

***9/ Kiel nun statas via kunlaboro kun esperantistoj de aliaj urboj de la regiono?***
Mi komunikiĝas kun multaj homoj diversmaniere: per poŝto, per sociaj retoj, telefone. Mi deziris partoprenigi en VER tiom da volgiaj esperantistoj, kiom mi sukcesos trovi. Do, dum la preparado mi kontaktis multajn kaj kolektis utilajn informojn pri la ebloj de la regiono. Nun ni jam pli klare komprenas, kun kiuj homoj eblas kunlabori en estontaj projektoj. Espereble, post VER aperos rezolucio, kiu fiksos niajn planojn, kune priparolitajn kaj akceptitajn.

***10/ Ĉu vi havas kunorganizantojn el aliaj urboj de Volgio?***
Jurij Karcev el Uljanovsko helpas al ni, pli frue li jam partoprenis en organizado de VERoj kaj aliaj aranĝoj.

***11/ Vi havas movadajn planojn ankaŭ por somero 2020. Bonvolu mallonge rakonti pri ili.***
Jes, mi havas planojn, ligitajn kun Gruŝin-Festivalo de barda kanto, sed tiuj planoj ankoraŭ ne estas konkretaj. Eble, ni organizos iun Esperantan programon dum la festivalo.

***Ni deziras al vi realigon de ĉiuj viaj planoj kaj multajn sukcesojn al la proksimiĝanta VER-16!***

***Intervjuis: Irina Gonĉarova,***
*REU-respondeculo pri regiona agado*

***Kluba vivo***

## Barnaulaj esperantistoj en la muzeo de kosmonaŭto

La 18-an de oktobro la muzeo de kosmonaŭto German Titov (kiu troviĝas en setlejo Polkovnikovo, proks. 70 km de Barnaul) oni organizis ekspozicion, dediĉitan al la patro de l' kosmonaŭto, esperantisto Stepan Pavloviĉ Titov, aktiva movadano, kiu korespondis kun e-istoj de la tuta mondo.



La organizantoj invitis nin - barnaulajn esperantistojn - al la solena malfermo de l' ekspozicio. Oni invitis ankaŭ lernejanojn el la loka lernejo. Dank'al tio la evento trafis la tutrusian projekton "Unu leciono pri Esperanto por lernantoj".
En la komenco la reprezentantoj de l' muzeo rakontis al la infanoj pri S.P. Titov kaj lia fama filo. Poste la direktoro prezentis nin kaj donis eblecon iom "prelegi". Ikar' Akimenko rakontis pri Esperanto ĝenerale, pri historio kaj kondiĉoj de ĝia apero, pri L. Zamenhof kaj pri la nuna stato de la lingvo kaj movado. Li rakontis ankaŭ pri sperto de sia esperantista familio, pri siaj tutfamiliaj esperanto-vojaĝoj, kaj deklamis esperantlingvan versaĵon.
Gennadij Jaskov rakontis pri nia klubo kaj pri historio de Esperanto en Barnaulo. Ankaŭ pri siaj esperantistaj aventuroj en junaĝo. Miĥail Ĥromov priskribis perspektivojn de la lingvo kaj movado en estonto, kaj rakontis pri praktika uzado de Esperanto en komercaj internaciaj projektoj. Kaj Alona Akimenko aranĝis kaj gvidis malgrandan, sed riĉan je ekzemploj, interesan kaj gajan lecionon de Esperanto por la lernejanoj, kun ilia spontanea kaj entuziasma partopreno.




Krome, la eventon ĉeestis Nikita Kungurov - esperantisto el Iĵevsko, kiu jam gastis ĉe Barnaulaj e-istoj ĉi-somere; kaj David' & Artur' Akimenko - denaskuloj samaĝaj al la invititaj lernejanoj, ili montris la ekzemplon de viva natura parolado.
Post la prezentaĵo ĉiuj observis la mem ekspozicion, metis la demandojn kaj ricevadis respondojn.
En la fino la direktoro invitis nin iom teumi kaj babili neformale.
Ĝenerale, post la evento ĉiuj estis tre kontentaj: la muzeaj laborantoj, la lernejanoj, kaj certe ni, barnaulaj e-istoj.

Dankon pro la invito al la direktodo de la muzeo Tatjana Kajgorodova, al muzeaj laborantoj Natalja Boriskova, Tatjana Podolskaja, Olga Kovalenko, Grigorij Borisov kaj ĉiuj aliaj, kies nomojn ni ne scias, sed kies amikemon kaj afablecon ni vere sentis kaj sentas.
Ni esperu, ke la ekspozicio daŭros ĝis la komenco de l' januaro, kaj ni povos montri ĝin al siberiaj (kaj ne nur siberiaj) esperantistoj dum la Novjara renkontiĝo 2020!

***Ikar Akimenko***

## Moskvanoj kolektiĝis postsomere

La 22-an de septembro en unu el moskvaj lingvaj lernejoj jam la train fojon pasis PostSomERe — la tradiciiĝanta renkontiĝo de Moskva Esperanto-Asocio MASI. Laŭ la origina ideo ĝi devus esti dediĉita al someraj impresoj de MASIanoj, sed ĉi-foje la temo estis ŝanĝita. Evidentiĝis, ke inter 30 anticipe anoncintaj sin partoprenontoj estis multaj novuloj, kelkaj el kiuj jam iĝis membroj de MEA MASI, sed neniam en sia vivo partoprenis iun ajn esperantistan kunvenon en realo. Kaj gaste intencis veni deko da nemasianoj. Tial la aranĝo iĝis dediĉita ĉefe al konatigo de la venintoj inter si kaj kun MASI-agado.




Ĉar anticipe ne estis konata lingvonivelo de ĉiuj novuloj, okazis multaj simplaj distraĵoj. Dum la Malfermo je la 17-a horo al la improviza podio estis invititaj dek personoj, en kies nomoj ĉeestas iu litero de la vorto "postsomere". Ili devis konkorde kompili la nomon de la aranĝo el la diverskoloraj grandaj literoj. Tiu ĉi gaja kaj tumulta proceduro malstreĉis ĉiujn kaj preparis konvenan etoson por nom-ludo en komuna rondo. Sekvis amuza laŭrola voĉlegado de la rusa fabelo "Rapo", kiun partoprenis senescepte ĉiuj.

Proksimiĝis solena momento: inico al esperantistoj. Ĝin enkondukis komuna kantado de bonveniga kanto por novuloj kun gitarakompano de por ĉiuj konata melodio. Al la podio estis invitataj kvin novuloj — membroj de MEA MASI, kies taŭga lingva nivelo jam estis pruvita kaj por kiuj tiu ĉi renkontiĝo estis la unua. Kontraŭ ili ekstaris prezidanto de REU Aleksandr Lebedjev kaj membro de Esperanta Akademio Nikolao Gudskov, tenantaj la Esperanto-flagon. Unu post la alia venas la elektitoj al la flago kaj, tuŝante ties ŝtofon, diras: "Mi estas esperantisto". Sonas muziko kaj aplaŭdoj, la nova esperantisto ricevas insignon kun la surskribo "Mi parolas Esperanton". Post kiam ĉiuj kvin deklaris sian esperantistecon, ili laŭvice voĉlegas refaritan poemon de Julio Bagi "Iĝis mi esperantisto".
Kunordiganto de MEA MASI Irina Gonĉarova faris prezentadon "Aktuala agado de MEA MASI", rompatan per elpaŝoj de aliaj homoj en konvenaj rakontonodoj. Ekzemple, la novbakita esperantisto Dmitrij Vasiljev, nun finlernanto ĉe la parola kurso “Faru la Rondon!”, rakontis pri sia longa vojo al Esperanto. Alia novulino Kira Poliŝĉuk invitis ĉiujn al sia lingva prelego dum la vica kunveno de la Esperanta parola klubo kaj Svetlana Smetanina enmanigis KER-atestojn al la ekzamenitoj de virtuala parola sesio, okazinta en Moskvo aprile 2019. Sekvis demonstrado de filmeto, muntita el intervjuoj de ekzamenitoj, faritaj post la ekzameno por la jutub-kanalo de MEA MASI “Esperanto: la unua kanalo”. Fine okazis komuna kantado de popularaj kantoj en Esperanto kun konataj por ĉiuj melodioj. Lastmomente aperinta Mikaelo Abramoviĉ okazigis humur-kvizon “Ĉu do judo?”, kiun gajnis Tatjana Glaznica kaj preskaŭ gajnis Petro Fedosov. Kronis la aranĝon abunda manĝado kun vigla libera babilado kaj longaj ĝisrevidoj.
Ni multe dankas al Ludmila Vasiljeva, Mikaelo Abramoviĉ kaj Aleksandr Basov pro prizorgo de la abunda regalado, Aleksandr Basov pro teknika helpo, Mikaelo Abramoviĉ pro humura ludo Valerij Filin pro gitarakompanado, Petro Fedosov pro sinkrona interpretado por unusola gasto-neesperantisto, Ludmila Novikova pro aliĝo al MEA MASI, Svetlana Smetanina pro rakonto pri KER-ekzameno kaj enmanigo de la Atestoj, Nikolao Gudskov kaj Aleksandro Lebedev pro modela flagotenado, ĉiuj novuloj, kiuj montris sin komprenantaj Esperanton kaj kelkaj eĉ libere ĝin parolantaj, kaj ĉiuj-ĉiuj, kiuj venis kaj subtenis la hejmecan kaj gajan etoson de la renkontiĝo.



Alte taksis la aranĝon unuafojaj partoprenintoj.
La 16-jara liceano, memlernanto de Esperanto Dmitrij Abramov skribis: “En PostSomERe kunvenis amikemaj homoj, kiuj rilatis al mi samkiel al malnovaj anoj de la komunumo, mi sukcesis preskaŭ kun ĉiuj estigi dialogon. La organizado estis altnivela. Malgraŭ tio, ke mi nelonge lernas Esperanton kaj dume ne povas paroli ĝin bone, mi povis ĉion komprenadi kaj restis kontenta pri la prezentaĵoj kaj pri la komunikado kun la homoj. Apartan dankon pro la bongustega akvomelono!”
Dmitrij Vasiljev, ankoraŭ lernanta Esperanton ĉe la parola kurso “Faru la Rondon!”, skribis: “Mi unuan fojon parolis Esperante dum unu minuto antaŭ granda grupo de homoj. Tio estis ne facile por mi, sed mi akiris bonan sperton”.
La ĵus diplomiĝinta lingvisto Kira Poliŝĉuk diris: “Jes, mi interesiĝas pri la tuto. Ekzemple, el MASI-agadoj mi sciis nur pri la lingvaj festivaloj, ekscii pri multo alia estis interese por mi. Scii pli pri disvastigo de esperanto kaj la esperanto-movado entute estas por mi multe pli interese, ol ludoj. Mi volas tiom kontribui al la tuto, kiom miaj ebloj permesos. Mi ĝojegis finfine paroli Esperante kun samideanoj en reala vivo. Eĉ interrete sentiĝas esperanta etoso, sed en reala vivo ĝi estas kompreneble multe pli forta. Mi bedaŭras, ke mi ne venis antaŭe, malgraŭ ke mi revis pri tio, okazis nur pro lacecego pro la univesitato. Mi kore dankas pro via prizorgo!

***Irina Gonĉarova,***
*kunordiganto de MEA MASI*

## Enciklopedio rakontas pri tomskaj esperantistoj

En la enciklopedio de Tomska regiono (volumo 2, paĝo 934, 2009) aperis artikolo pri Tomska Esperanto-Klubo. La artikolon eblas legi kaj komenti en retejo Filolingvia:
http://filolingvia.com/publ/tomskij_ehsperanto_klub/228-1-0-5791
Tiu ĉi artikolo jam estas la 100-a en rubriko "Lingvo Esperanto" en Filolingvia:
http://filolingvia.com/publ/228
En rubriko "Novaĵoj de Esperanto" en Filolingvia aperis 87 artikoloj:
http://filolingvia.com/news/1-0-7

*Vladimir Minin*

***Oni pri ni***

## Prezidento de Usono D. Trump ŝanĝis nomon de la ĉefo de Pentagono Mark Esper al Esperanto



Komentante en Tvitero eliron de la usonaj milittrupoj el Sirio, Trump referencis la raporton de la “defendministro Mark Esperanto”. Ni memorigas, ke Esperanto estas artefarita internacia lingvo kun simpligita leksiko. Dume ne klaras, ĉu tio estis eraro aŭ la vica ekstravaganco de la ĉefo de la Blanka Domo.
https://echo.msk.ru/news/2522813-echo.html

***La unua rimarkis Boris Kolker***

## *Klubo de instruistoj*

*Ni daŭrigas la rubrikon "Klubo de instruistoj" kaj aperigas vican materialon de Vladimir Opletaev.*

# Formoj de la Esperanto-instruado

Formo estas sensebla aspekto, kiun objekto prezentas ekstere kaj ankaŭ maniero, laŭ kiu iu afero evidentiĝas[1]

La vorto devenas de la latina "forma"- "aspekto", "eksteraĵo", "konturoj de objekto". Tiu ĉi nocio estas vaste uzata en la ĝenerala didaktiko kaj en la metodiko de lingvoinstruado. Ni provu trakti ĝin tra la prismo de la Esperanto-instruado, kiu, krom apartaj specifaĵoj, posedas ĉiujn ordinarajn trajtojn de la instruado de fremdaj lingvoj. La artikolo estas destinita por instruantoj de Esperanto. Precipe interesaj por la esploro estas tri aspektoj de la termino "formo":

1) formoj de klerigo;
2) formoj de instruado;
3) formoj de organizado kaj efektivigado de instruprocezo.

**I.**

Tradiciaj formoj de klerigo aŭ formoj de aliro al akirado de scioj en Rusio konforme al la artikolo 17 de la leĝo "Pri la klerigo en Rusia Federacio" (en la redakcio de 26.07.2019) estas:
ĉeesta lernado;




ĉeesta-koresponda lernado (ekz. vespera lernado);
koresponda lernado;
familia lernado;
aŭtodidakta lernado / memlernado (inkluzive de "eksternat" – memlernado kun postsekva ekzameniĝo por ricevi oficialan ŝtatan atestilon);
distanca lernado.[2]

Kio koncernas diversajn alireblajn formojn de la Esperanto-lernado, ĉiuj supre menciitaj ebloj riveliĝas praktike, kvankam sen oficiala ŝtata atestado.

**Ĉeesta kaj ĉeesta-koresponda lernadoj** efektiviĝas tra ĉeestaj kursoj, en la plimulto de la okazoj movadaj, t.e. neoficialaj klubaj aŭ privataj, diversgradaj kaj diversdaŭraj.

**Koresponda lernado**, kiu estis tre populara kaj amasa en la la 60aj – 80aj jaroj de la pasinta jarcento en la periodo de tradiciaj paperpoŝtaj kontaktoj, daŭre efektiviĝas tra korespondaj movadaj kursoj, plejparte privataj, gvidataj jam surbaze de retpoŝtaj ligoj.

**Familia lernado** kondiĉas edukadon de denaskaj esperantistoj, sed la fenomeno restas daŭre sufiĉe rara.

**Memlernado de Esperanto** en la interreta epoko fariĝas ĉiam pli kaj pli evidenta realaĵo, kiu manifestiĝas per diversaj retaj kursoj ĉe popularaj retejoj ekz. ĉe lernu.net, duolingo.com kaj aliaj kaj insiste defias tradici-klasikajn formojn de la lernado de Esperanto.

**Distanca lernado** baziĝas sur aplikado de modernaj komputilaj kaj retaj informaj teknologioj, unavice de tujmesaĝiloj, evidentigas multajn avantaĝojn kaj ĉiam pli aktive antaŭenigas sin.

Traktante diversajn formojn de klerigo kaj lernado, oni devas ĉiam konsideri la fakton, ke respektive ekzistas ankaŭ koncernaj formoj de instruado. Sed ĉar la instruado de Esperanto en Rusia Federacio preskaŭ senescepte, krom kelkaj sporadaj oficialaj universitataj kursoj, estas afero de volontuloj-instruantoj, ĝi ne havas ŝtatan apogon, kaj por konfirmi atingitan lingvonivelon, oni devas apelacii al sendependaj atestaj establoj, ekzemple trapasi la lingvan ekzamenon ĉe UEA laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER, niveloj B1, B2, C1).[3]

**II.**

Rilate al la edukado kaj instruado la nocio "formo" estas uzata duaspekte: formo de instruado kaj formo de la organizado kaj efektivigado de instruprocezo.

**Formo de instruado** kiel didaktika kategorio konsistigas eksteran aspekton de la instrua procezo, ĝi dependas de konkretaj faktoroj: celoj, enhavoj, metodoj, instruiloj, instrukondiĉoj, instruataj celgrupoj, lingva kaj metodika kompetentecoj de instruisto kaj multaj aliaj elementoj. Plej diversaj klasifikoj de instruformoj ekzistas. Ili ne estas plejofte strikte sciencaj klasifikoj, sed ili ordigas kaj prezentas instruformojn laŭ konkretaj kriterioj. Tradicie temas pri tutklasa, kolektiva, grupa, partnera, individua instruformoj.

**Tutklasa instruformo** devenas de absoluta tradicia gvidrolo de instruisto en la leciono, kiu laboras en unu ritmo samtempe kun ĉiuj lernantoj pri unu komuna lernotasko. La komuna celo, metita al la tuta klaso fariĝas celo de ĉiu lernanto. Instruisto kaj lernantoj interagas. La tutklasa instruformo estas aplikata en ĉiuj etapoj de leciono dum trejnado de lernantoj pri alproprigo kaj praktika aktivigo de novaj scioj, dum kontrolo de hejmaj taskoj.

<u>Avantaĝoj de la tutklasa instruformo</u>

Kadre de la tutklasa resp. tutgrupa instruformo temas pri strikte strukturita leciono.
Tre gravas la eduka, organiza, gvida roloj de instruisto.
Ĉiuj lernantoj dum la leciono provas diversajn agadformojn.

<u>Mankoj de la tutklasa instruformo</u>

La tuta laboro ĉefe estas orientita al meznivela lernanto.

Lernantoj estas nek memstaraj nek iniciatemaj, ili estas devigataj plenumi la planon de instruisto.
Instruisto apogas sin sur pli aktivaj lernantoj.
Ne estas facile organizi individuan laboron kun lernantoj.
La enhavo de instruata materialo estas unueca por la tuta klaso.
La akiritaj scioj ofte estas formalaj, rapide forgesiĝas.

**Kolektiva instruformo** baziĝas sur kooperado de lernantoj en paroj aŭ etgrupoj, distribuo kaj regula interŝanĝo de taskoj kaj roloj inter ili (ekz. instruisto-lernanto), multa interkomunikado dum lecionoj (ekz. instruado en formo de rolludoj) inkluzive de memkontrolo kaj memrespondeco de ĉiuj lernantoj pri komuna lernotasko. Instruisto kaj lernantoj interagas. La profesia pedagogia nivelo de instruisto devas esti tre alta. Kolektivaj instruformoj estas ofte aplikataj en lecionoj, en kiuj gravas kaj unuarangas situaci-komunikaj kaj intensaj metodoj de instruado.

<u>Avantaĝoj de la kolektiva instruformo</u>

Konsidero kaj atento al individuaj kapabloj de lernantoj.
Konstanta memstara kunlaboro kaj interhelpo de lernantoj: ĉiuj instruas ĉiun kaj male ĉiu instruas ĉiujn.
Reciproka memkotrolo kaj memstara korektado de eraroj.
La instruprocezo ene de grupoj estas pli intensa kaj pli aktiva ol en tutklasaj lecionoj.
Gravas aktivigo de interpersonaj kontaktoj: lernanto – lernanto.
Kunlaboro de lernantoj en paroj kaj grupoj kun konstanta interŝanĝo de partneroj kaj roloj.

<u>Mankoj de la kolektiva instruformo</u>

La instruprocezo ne estas strikte strukturita.
Amplekso de instruata materialo estas malpli granda ol en tradiciformaj lecionoj.
Minimumas kontaktoj inter instruisto kaj lernantoj.
Ne estas facile taksi individuan laboron de apartaj lernantoj.

**Grupa instruformo** riveliĝas per kunagado de kelkaj malgrandaj gupoj (3 – 7-personaj), kies membroj plenumas diversajn rolojn kaj partoprenas en diskutoj kaj opiniinterŝanĝoj. La taskoj povas esti apartaj por ĉiu grupo aŭ ĉiu grupo plenumas unu kaj la saman taskon. Instruisto kaj grupoj de lernantoj interagas. Rezultoj de la engrupa laboro estas prezentataj al klaso por komuna pritakso. Instruisto estas observanto, kiu minimume influas la laboron de grupoj. La grupaj instruformoj estas aplikeblaj en ĉiuj etapoj de leciono.

<u>Avantaĝoj de la grupa instruformo</u>

Lernantoj estas egalrajtaj subjektoj, kiuj klopodas kolektive solvi problemojn.
Lernantoj regule interŝanĝas komunikajn rolojn.
Lernantoj identigas sin kun samgrupanoj kaj lernas komunikiĝi kun ili.
La grupa instruformo motivas lernantojn al pli intensa kogna procezo.
En la grupo lernantoj evoluigas kritikajn alirojn al problemoj.

<u>Mankoj de la grupa instruformo</u>

Ne estas facile formi samfortajn kaj samnivelajn grupojn.
Lernantoj ne ĉiam povas adekvate memstare kompreni la studatan materialon.
Ene de grupoj ekzistas diferencoj inter pli fortaj kaj malpli aktivaj lernantoj.
Kunlaboro de lernantoj en grupoj ofte kaŭzas bruon kaj debatojn.

**Partnera instruformo** celas kunlaboron de du personoj, kiuj plenumas unu komunan lernotaskon. Ju pli pozitive la partneroj kontaktas unu la alian des pli efike rezultas ilia kunlaboro. Lernanto kaj lernanto interagas.

<u>Avantaĝoj de la partnera instruformo</u>

La partnera instruformo estas realigebla sendepende de la aĝo de lernantoj.
Tiun ĉi instruformon oni povas realigi sufiĉe facile.
Ĝi ebligas al lernantoj alproprigon de lernmaterialo kaj samtempe aktivigas ilin dum interkomunkiĝo.
Ĝi stimulas evoluigon de memstara agado de lernantoj.
Ĝi estas aplikebla en ajna lecionetapo.

<u>Mankoj de la partnera instruformo</u>

Lernantoj ne ĉiam strikte sekvas lernotaskojn.
Lernantoj ofte ne povas samnivele kunlabori.
Partneroj ne ĉiam egale kontribuas por realigo de lernotasko.
Partnera kunlaboro povas kaŭzi bruon, debatojn kaj konfliktojn.

**Individua instruformo** ebligas kontaktojn de instruisto kun unu lernanto, plenumanta individuajn taskojn. Instruisto kaj lernanto interagas. La individua instruformo estas aplikata en ĉiuj etapoj de leciono. La lernoprocezo estas individuigata cele al ĉiuflanka malkovro de latenta potencialo de lernantoj.

<u>Avantaĝoj de la individua instruformo</u>

Aparta kaj memstara kogna procezo de lernado fare de lernantoj.
Lernantoj evoluigas kapablojn pri mempritakso de propraj atingoj.
Lernantoj havas eblon elekti propran lernoritmon kaj amplekson de lernotaskoj.
La agado de lernantoj estas funde kontrolata, analizata kaj taksata de instruisto.

<u>Mankoj de la individua instruformo</u>

Lernantoj lernas izolite sen apogo al spertoj de aliaj lernantoj.
La atingitaj rezultoj koncernas nur apartan lernanton kaj instruiston.
Lernantoj ofte spertas emocian malkomforton pro neeblo komunikiĝi kun samaĝuloj.
Kolektivaj kaj grupaj lernstrategioj restas sen atento.

Kiel oni povas konstati, la instruformoj havas kaj plurajn avantaĝojn kaj neeviteblajn mankojn. Gvidantoj de Esperanto-kursoj aplikas ĉiujn instruformojn. Preferataj estas tutklasaj / tutgrupaj lecionoj. La elekto de konkreta instruformo dependas de praktikaj celoj kaj metodoj, uzataj de Esperanto-instruistoj. Ĉar la bazaj kursoj de Esperanto estas ordinare ne tro longdaŭraj, kaj ĉar la aplikataj metodoj estas kutime miksitaj, la instruformoj en diversaj lecionetapoj estas aktive variigataj t.e. ene de tutklasaj okupoj oftas ankaŭ taskoj por grupoj, paroj kaj unuopaj kursanoj. Aparte aktive kursgvidantoj turnas sin al grupaj, partneraj kaj individuaj instruformoj dum trejnado de kursanoj pri gramatika kaj leksika materialoj kaj en lecionoj resp. lecionpartoj, ligitaj kun aktivigo de la kapabloj: parola kapablo kontinua kaj interaga, legokomprena, aŭdkomprena kaj skriba kapabloj.

**III.**

**Formo de organizado kaj efektivigado de instruprocezo** rilatas al konkreta tipo de leciono, al ĝia konstrukcia koncepto, ekzemple: leciono, seminario, konferenco, ekskurso, ludo, studkontrolo, ekzameno ktp. Unueca klasifiko de instruformoj neniam ekzistis. Nun oni povas trovi multajn klasifikojn de organizaj instruformoj, kiuj subiĝas al diversaj didaktikaj principoj kaj celoj.

Ekzemple en la tridimensia modelo de profesoro Valentin Andrejev la supre menciitajn du formojn kompletigas la tria interna instruformo, kiu traktas strukturan interligon de diversaj elementoj de leciono depende de praktika instrucelo: enkonduka leciono, leciono por komuniko de nova materialo, leciono por sistemigo de akiritaj scioj, leciono por kontrolo de scioj kaj kapabloj; kombinitaj organizaj formoj de lecionoj.[4]

Doktoro Andrej Ĥutorskoj distingas tri tipojn de organizaj instruformoj: individuaj, kolektivaj-grupaj, individuaj-kolektivaj instruformoj.

Al la individuaj instruformoj apartenas: memlernado, familia lernado, lernado kun guvernistoj kaj mentoroj, individuaj perfektigaj lecionoj, privataj individuaj kromlecionoj ktp.

La kolektivaj-grupaj instruformoj inkluzivas lecionojn, lekciojn, prelegojn, konferencojn, seminariojn, diskutojn, debatojn, olimpikojn, ekskursojn, aferludojn ktp.

La individuaj-kolektivaj instruformoj estas temaj, kreaj kaj sciencaj semajnoj, konkursoj, klerigaj projektoj ktp.[5]

Ĉiujare en Rusio okazas diversaj esperantistaj movadaj, klerigaj kaj instruaj aranĝoj, kiuj ofertas al partoprenantoj interesajn kaj buntaspektajn programojn. Tiuj ĉi aranĝoj estas pli multe klerigaj kaj distraj ol nur instruaj, sed ili ĉiuj efektiviĝas en Esperanto kaj sekve apriore plenumas diversajn lingvoklerigajn kaj edukajn funkciojn. Por fari pritrakton de plejofte aplikataj kaj ŝatataj agoformoj kun instrua, kleriga kaj distra fonoj, estis revuitaj programoj de kvin regionaj esperantistaj renkontiĝoj de la jaro 2019: NOVOJARSK-2019 (Krasnojarsko), OSER-50 (Tomsko), APERo-13 (Apudmoskvo), Printempa lingvotrejnado-4 (Jekaterinburgo), TEMoj-2019 (Tiĥvino) kun entute pli ol 200 partoprenintoj el dekoj da rusiaj kaj eksterlandaj urboj kaj lokoj.[6]

La tuta ekstraktaĵo de preferataj organizaj formoj sugestas buntan gamon de programeroj grandparte rilataj al la organizaj formoj ”kolektivaj – grupaj”:
A-B-C-nivelaj kursoj, mallongdaŭraj dumaranĝaj daŭrigaj paroligaj kursoj,
prelegoj, fakaj seminarioj, movadtemaj seminarioj, konferencoj, diskutrondoj, debatoj, spertinterŝanĝoj,
diversfakaj konkursoj, interpretaj konkursoj, konkursoj por komencantaj esperantistoj, lingvaj, literatur-kulturaj kaj movadaj kvizoj, lingvaj, intelektaj, psikologiaj, societaj ludoj,
diverstemaj aŭtoraj metiejoj, prezentado de interesaj projektoj, prezentado de Esperantaj libroj, bardaj koncertoj, muzikaj koncertoj, filmspektadoj,
ekskursoj, vizitoj al teatroj kaj muzeoj, distraj vesperaj programoj, sportaj aranĝoj,
informaj programoj por neesperantista publiko, intervjuoj al amaskomunikiloj.
La praktika agado de esperantistaj kluboj kaj societoj kaj de apartaj esperantistoj estas multe pli varia kaj multflanka, kaj ĝi evidentigas sukcese realigatajn individuajn-grupajn kaj kolektivajn-grupajn projektojn, destinitajn kaj por esperantistoj kaj por neesperantista publiko: lingvaj festivaloj, KER-ekzamenoj, partopreno de esperantistoj en diversaj soci-kulturaj aktivaĵoj: “Nokto en muzeo”, “Nokto en biblioteko” ktp.

Konscia kaj pripensita aliro al aplikado de konkretaj instruformoj en la instruado de Esperanto kreas kondiĉojn por sukcesa kaj pli efika instruprocezo kaj posta kleriga agado inter esperantistoj. La praktiko montras, ke lerta kombinado de diversaj instruformoj en Esperanto-lecionoj kaj en apartaj lecionetapoj malkovras vojon al efika, senĝena kaj fruktodona interagado de kursgvidantoj kaj lernantoj de Esperanto.

**Literaturo**

1. La nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto – Paris: SAT, 2002 – 1268 paĝoj.
**2. Федеральный закон "Об образовании в Российской Федерации" N 273-ФЗ от 29 декабря 2012 года с изменениями 2019 года** http://zakon-ob-obrazovanii.ru/
3. UEA-KER https://edukado.net/ekzamenoj/ker
4. Андреев В.И. Педагогика: Учебный курс для творческого саморазвития / 3-е издание – Казань: Центр инновационных технологий, 2012 – 808 стр.
5. Краевский В.В., Хуторской А.В. Основы обучения: Дидактика и методика: Учебное пособие для студентов высших учебных заведений. – 2-е изд., стер. – М.: Издательский центр «Академия», 2008. – 352 с.
6. “Bulteno de Rusia Esperantista Unio” – “Ponto”, REU, 2019 - №№ 101, 102, 104, 107.

***Vladimir Opletajev***

# MESAĜO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO OKAZE DE LA TAGO DE UNUIĜINTAJ NACIOJ, 24 OKTOBRO 2019



Okaze de la Tago de Unuiĝintaj Nacioj 2019, la mondo frontas defiojn daŭre kreskantajn – ekde la klimata krizo ĝis la daŭra kaj eĉ intensiĝanta malpaco en multaj mondopartoj. Kaj Unuiĝintaj Nacioj mem estas minacata de financa krizo kaŭzita de la rezisto de multaj membraj ŝtatoj al ĝustatempa kaj plena pagado de siaj porcioj de la kostoj.

Se iam estis tempo kiam la popoloj de la tuta mondo alpaŝu Unuiĝintajn Naciojn por esprimi sian apogon, tiu tempo estas hodiaŭ.

Jam de la komenco de Unuiĝintaj Nacioj, nia Asocio, la Universala Esperanto-Asocio, ĉiam subtenis ĝiajn celojn kaj idealojn. Jam de la jaro 1954, do de 65 jaroj, nia Asocio ĝuas konsultajn rilatojn kun UNESKO; kaj jam de la jaro 1950 ni komencis dialogon kun Unuiĝintaj Nacioj kiu poste kondukis al formalaj rilatoj kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio. Ni senlace laboras inter niaj membroj kaj la membroj senlace laboras inter la publiko en pli ol cent landoj, por disvastigi informojn pri UN kaj trovi kampojn kie ni povas kune labori. La klopodo vivteni kaj funkciigi la sistemon de UN havas la saman idean bazon kiel nia klopodo disvastigi Esperanton, nome krei harmonian, pacan kaj egalecan rilaton inter ĉiuj homoj, de ĉiuj sociaj fonoj, cele al vera kaj kompleta interkompreniĝo.

Ni promesas, ke ni restos plene dediĉitaj al Unuiĝintaj Nacioj kaj daŭros aktive laboradi por konsciigi homojn pri la graveco de toleremo, diverseco kaj solidaro kiel vojoj por teni pacon kaj por kontribui al vere libera kaj emancipita socio, kie regu amikeco kaj respekto inter ĉiuj homoj kaj popoloj.

Ni taksas esenca la rilatadon de UN kun instancoj de la civila socio, ĉar grupoj de la civila socio kapablas rekte rilati kun homoj kaj tiel efektive disvastigi la valorojn de UN. Ni konscias, ke UN ne kapablas atingi siajn altajn celojn nek plenumi siajn specifajn programojn sen la ktiva kunlaboro de ni ĉiuj en spirito de egaleco kaj reciproka respekto.

En la jaro 2020, nia Universala Kongreso de Esperanto (Montrealo, Kanado, 1-8 aŭgusto) estos aparte dediĉita al festado de la 75-jara jubileo de Unuiĝintaj Nacioj. Ni alvokas al nia membraro kaj al ĉiuj Esperanto-asocioj kunlabori por ankoraŭ pli vaste informadi pri UN kaj ĝia graveco por la monda paco, kaj aliĝi al ĝiaj programoj kaj iniciatoj kiam kaj kie eble, ekzemple pere de naciaj UN-Asocioj. Ni petas, ke ili venu amase al Montrealo por kunfesti la atingojn de UN kaj ke jam nun ili disvastigu tiun ĉi mesaĝon en la propraj medioj kaj inter la publiko.

***Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 831 2019-10-24***

## *NOVOJARSK-2020*

Karaj amikoj, kun ĝojo ni informas vin, ke novan 2020 jaron ni invitas renkonti en Barnaulo – la ĉefurbo de Altaja regiono. Vin atendas varma kompanio, riĉa, tamen ripoza programo kun novjara festeno, variaj aranĝoj, promenoj, ekskursoj en olda, sed juna Barnaulo.




**Datoj:**
31.12.2019 - 5.01.2020

**Loĝado:**
Ni trovis agrablan hostelon (t.e. hoteleton / junulargastejon) en la centro de la urbo, kio estas evidenta avantaĝo. Ĝi nomiĝas "Raduga" kaj situas laŭ adreso: str. Krupskoj, 103a. La kosto de loĝado estas 400 rub./diurno.
En la hostelo troviĝas 2 ĉambroj 8-lokaj (po 4 "duetaĝaj" litoj), 2 ĉambroj 4-lokaj (po 2 "duetaĝaj" litoj), 1 ĉambro 2-loka (2 apartaj litoj), 1 ĉambro {1+1}-loka (1 dupersona lito (taŭgas ekz. por geedzoj). Do, se vi venas pare kaj deziras loĝi en aparta ĉambro (unu el du lastaj variantoj), bv. indiki tion en la letero, konfirmanta sendon de la kotizo, al don_ikar@mail.ru. Du lastaj variantoj jam estas rezervitaj fare de la plej aktivaj aliĝintoj, do ne plu estas elekteblaj.

**Manĝado:**
Varianto 1: 3-foja/tage manĝado en la manĝejo de la hostelo - 350 rub./tage.
Varianto 2: Eblas zorgi pri sia manĝado memstare. En la hostelo troviĝas moderna kuirejo kun ĉio necesa: mikroondilo, fornelo, malvarmigilo, te-kaldrono ktp. Sufiĉe proksime al la hostelo troviĝas komunmanĝejo, kafejo kaj picejo, ankaŭ magazenoj ĉeestas.

**Novjara festo:**
La bankedo estos organizita kun helpo de la posedantoj de la hostelo (t.e. la manĝaĵojn preparos iliaj kuiristoj). La kosto: 800 rub./persono. Sen alkoholo

(dezirantoj zorgu memstare). Se la partoprenantoj de la Novjara renkontiĝo malmultos, la posedantoj de la loko povas akcepti aliajn gastojn paralele kun ni.

**Programo:**

Estas pridiskutata. Ni akre bezonas viajn proponojn!

Programeroj estos aranĝitaj en la granda manĝejo (la bankeda halo, kiu eĉ havas malgrandan scenejon) de la hostelo. Tamen, ni ne havos la halon en nia plena dispono tutdiurne - necesas indiki la horojn! Do, anticipe preparita programo estas bezonata ankaŭ pro ĉi tiu kialo.

**Ekskursoj:**

- muzeo de la dua en la mondo kosmonaŭto German Titov. Lia patro, S. P. Titov, estis esperantisto, kaj en la muzeo funkcios aparta ekspozicio, dediĉita al li. 200 rub. –muzeo de kosmonaŭtiko + domo-muzeo de familio Titov, + 200 rub. – luado de buso.
- Altaja regionografia muzeo. Senpage.
- Aliaj ekskursoj estas pridiskutataj.

**Pagoj:**

Aliĝkotizo ĝis 30.11.2019 estas 500 rub. (por la tuta periodo); poste/surloke kaj por neplena periodo: 100 rub./diurne.

Aliĝkotizo ordinare ne redoneblas, des pli, kiam elspezoj por organizado de la aranĝo estis faritaj, tamen O.K. pretas konsideri neatenditaĵojn.

Por studentoj validas 50% rabato de la aliĝkotizo. Por lernejanoj kaj pli junaj infanoj la aliĝkotizo estas nula, kondiĉe ke ili parolas Esperanton. (Tamen ne forgesu pri kostoj de manĝado, ekskursoj ktp, kiuj plu restas pagendaj.)

Aliĝo validas nur post via pago de la kotizo!!!

Granda peto: laŭeble sendi monon ne nur por la kotizo kaj la bankedo, sed ankaŭ (laŭeble) por la loĝado en la hostelo, pagendaj ekskursoj (se vi partoprenos) k.a., ĉar ĉi tiu mono estos uzata por la antaŭmendoj. (Certe, se vi havas problemon sendi tuj la plenan sumon - skribu al O.K., ni penos solvi la situacion.)

La 1-an de decembro ni devos konfirmi kvanton de loĝantoj en la hostelo kaj antaŭmendi buson al la muzeo de Titov. Do, rapidu aliĝi kaj kotizi ĝis tiu dato!

En la konfirmanta letero skribu: "Mi sendis 500+800+xxx rub. (kotizo + bankedo + io alia)".

La monon bonvolu sendi SEN KOMENTOJ EN LA MESAĜ-KAMPO al Sberbanka karto: 5336 6900 8897 9861

Игорь Анатольевич Акименко

NEPRE konfirmu sendadon de la mono per ret-mesaĝo al don_ikar@mail.ru

Sen tiu mesaĝo, la mono uzitos por komunaj aferoj.

**Aliĝi** eblas ĉe https://www.ural-sib.org/eo/novojarsk-2020#aliĝilo282

**Transporto:**

Kiel alveni Barnaulon:

Aviadile: Elektu flughavenon "аэропорт Барнаул (BAX)". Ekzistas rektaj flugoj el Moskvo, Sankt-Peterburgo, Irkutsko, Tomsko, Kazano, Krasnojarsko, Surguto, Simferopolo, Soĉio, Anapo, Karmanjo, Antaljo. La retejo de la flughaveno: www.airaltay.ru. Eblas trovi plej malmultekostajn biletojn per Skyscanner.

Trajne: Ekzistas trajnoj el Moskvo, Novosibirsko, Bijsko, Samaro, Abakano, Krasnodaro, Tjumeno, Slavgorodo, Almato. El aliaj urboj eblas veni Barnaulon per alkroĉita varono aŭ ŝanĝante la trajnon en Novosibirsko. Spekti la horaron kaj aĉeti biletojn eblas ĉe tutu.ru aŭ www.rzd.ru

Buse: El proksimaj regionoj eblas atingi Barnaulon ankaŭ buse. La horaron eblas trovi en www.avtovokzal.ru, www.e-traffic.ru, sibirinfo.ru

**Kontaktoj:**

Ikar': telefono+WhatsApp+Telegram: +79069465040, E-mail: don_ikar@mail.ru

Alona: telefono+WhatsApp: +79132712338

La plej freŝajn novaĵojn pri Novojarsk-2020 vi povas vidi en nia grupo en VK https://vk.com/novojarsk2020

***Alvokoj***

# Karaj amikoj, bonvolu ne forgesi kotizi por la jaro 2020!

## KOTIZOJ de REU por 2020

***Membri en REU oni rajtas ekde la aĝo 18 jaroj; 14-17-jaruloj rajtas aliĝi kiel kandidatoj kun samaj rajtoj krom voĉdonrajto. Por iĝi membro de REU necesas nepre plenigi kaj sendi aliĝilon http://reu.ru/aliĝo/eo kaj pagi koncernan membran kotizon. Aliĝanto konsentas, ke lia/ŝia nomo, familinomo kaj regiono aperos en la publika membrolisto de REU.***

Oni rajtas aliĝi por unu aŭ por kelkaj sinsekvaj jaroj, paginte respondan kvanton da kotizaj sumoj.

1. Individua kotizo — 250 rub. (por ekster-KSŜ-anoj — 20 eŭroj). La individua membro ricevas elektronikforme membrokarton, «Ponton», Jarlibron de REU kaj aliajn informojn (ĉe neceso sendi oficialajn leterojn REU povas fari tion per ordinara poŝto), voĉdonrajton dum Konferenco de REU, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en REU-aranĝoj.
2. Membro-subtenanto — ne malpli ol 2-oblo de la individua kotizo. Membro-subtenanto ricevas ĉion saman kiel la individua membro.
3. Kolektiva kotizo — 200 rubloj por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj). Aligitaj membroj ricevas ĉion saman kiel la individuaj membroj.
4. Aliĝkotizo por nova aliĝinta kolektivo, aŭ okaze de realiĝo — 300 rubloj. Unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. Jam aliĝintaj kolektivoj ne pagas. Nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se kolektivo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi poste devas denove aliĝi al REU.
5. Kandidato — senkotiza aliĝo. Ricevas ĉion saman kiel individua membro krom voĉdonrajto.

6. Amiko de REU — pagas kiel la kotizon ajnan sumon. Personoj, ne atingintaj la 18-jaran aĝon, aliĝas kiel amikoj de REU senkotize.
Amiko de REU estas persono, kiu esprimas simpation al REU. Rajtas partopreni en programoj kaj aranĝoj, organizataj de REU kaj ricevi informmaterialojn de REU. Ne havas voĉdonrajton kaj rabatojn.

Plenan regularon pri membreco legu ĉe http://reu.ru/paghoj/kotizoj2019.html

## *Pagmanieroj*

**Sberbank**
Al la banka karto **5469 3800 7074 4643.** Ĝiron eblas fari senpere en bankoficejo, per la servo «Sberbank Online», per bankaŭtomato kaj terminalo.
Informo kaj instrukcioj: https://www.sberbank.ru/ru/person/remittance/sbercards.
**Tinkoff-bank**
Al la banka karto **5536 9138 1721 8676** Por pago uzu la servon https://www.tinkoff.ru/cardtocard.
**Jandeks.Mono**
Vi povas pagi al la monujo **41001363815184** en la sistemo «Jandeks.Mono». Informo kaj instrukcioj: http://money.yandex.ru/prepaid.
**WebMoney**
Vi povas pagi al unu el la monujoj en la sistemo «WebMoney»: **R260517915684** — rubla, **Z537491368483** — dolara https://www.webmoney.ru
**PayPal**
Vi povas fari ĝiron en dolaroj per la sistemo «PayPal» al la adreso amikko@yandex.ru**.** https://www.paypal.com
**Per kontanta mono**
Post anticipa interkonsento ĉe persona renkontiĝo kun la kasisto en Moskvo aŭ dum aliurbaj aranĝoj.
Bonvolu nepre konsideri, ke samtage kun la ĝiro **vi devas informi pri via pago** la kasiston retpoŝte aŭ per SMS-mesaĝo al la telefono.
Retpoŝto: amikko@yandex.ru**.** Telefonnumero: **+7 977 412 1753 (Aleksandr Lebedev)**
Vi devas informi pri celo de la pago, ĝirita sumo kaj nomo(j) de homo(j), por kiu(j) estas destinita la pago.
Se vi ne informos nin, **la mono estos konsiderata kiel anonima donaco por la kaso!**



***"Ponto" [Bulteno de REU*** **(BdR)] estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo "RUSIA ESPERANTISTA UNIO"**
**La revuon aŭtomate ricevas ĉiuj membroj de REU, ĉiuj ceteraj povas aboni ĝin ĉe la Estraro.**
***"Ponto"*** **atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru aŭ (kaj) Svetlana Smetanina svsmetanina@yandex.ru**

*Estraro de Rusia Esperantista Unio*

Redaktofino 10.11.2019